

V-19563 doi



LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Trimonata Revuo

Redakcio: Bamblev. 2, N3700 Skien

NE ISSN 0037-6558



Numero 3/1984

volumo 6


Aŭtuno 1984

AĜO

En Norvegujo la libertempoj estas leĝe priskribataj. Kaj ek de la 60-a jaro ĉiu norvego havas ekstran semajnon libera. Inter homoj tiu semajno nomiĝis "senil-vojaĝo". Mi mem jam ĝuas la rajton de tiu semajno.

De iu alia SELano mi antaŭ nelonge ricevis leteron, en kiu la skribinta i.a. diras: "Mi jam havas 67 jarojn kaj ne plu povas aktive partopreni.....". Dua leterskribanto diras: "Mi jam estas tro aĝa por esti skolto....."

Tamen oni (almenaŭ ĉe ni) diras: Iam skolto - ĉiam skolto. Kaj aĝo ne estas malsano kaj ne kreas malkapablon al taskoj. **Tamen:** SEL estas (t.e. devas esti) junular-movado. La intenco estas, ke la plimulto de la membroj estu infanoj - knaboj kaj knabinoj en plej aktiva kaj ludema aĝo. Kompreneble ankaŭ SEL devas havi plenaĝajn gvidantojn, sed io estas neĝusta, kiam la plimulto de junulara aŭ infana movado jam pasis 50 jarojn.



d.z 3/93

SEL

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Postbus 433

1500 EK Zaandam Nederlando

Poŝtgironto 54 36 47

Fondita 1918

Fondinto "Avoto" A W Thomson.

Kunfondinto: J W Leslie.

Honoraj Prezidantoj:

D H Davis, L J VanGulck

Ĝenerala sekretario: J K Hammer,
Taxisstraat 7, 1505 AA Zaan-
dam, Nederlando. Telefono:
075-16 69 31.

Kasisto kaj adminstranto de
"La Skolta Mondo": DH Withey,
21 Brookfield Ave, Waterloo,
Liverpool L 22 3ye, Britujo.
Telefono: 051 928 2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,
Bambleveien 2, 3700 Skien,
Norvegujo. Tel: 035-218 48.
Poŝtkonto 3 36 33 89.

infana movado jam pasis 50 jarojn.

Tio, **kompreneble**, ne estas iu riproĉo al la fideluloj, kiuj jaron post jaro laŭ sia kapablo restis en siaj oficoj kaj daŭre tenis vivon en SEL.

Sed tio estas forta admono al ĉiuj - al mi mem inkluzive - ke ni serĉu ĉiun eblecon kapti gejunulojn por nia movado. Kaj tion ni ne faras nur pagante kotizon kaj legante pli-malpli interesenhavan gazeton. Se la gazeto havu iun valoron, la aktivaj geskoltoj devas el ĝi ĉerpi ion. La ludon kun obstakloj, ekzemple. Sed ili devas scii, ke tiun ludon nia gvidanto

lernis en La Skolta Mondo. La geskoltoj devas vidi la gazeton. La geskoltoj devas scii, ke per ĝi ili povas trovi samaĝajn en aliaj landoj, kaj ke tiuj sanaĝuloj deziras interŝanĝi aĵojn kun ili. Kaj **ni**, mi sesdekjarulo, alia jam sepdek, tria sesdeksep, ni devas trovi novan pli junan personon por la ofico kiun ni hodiaŭ havas. Ne ĉar ni estas **tro** aĝaj, sed simple ĉar la vivo de SEL dependas de tio, ke ĉiam nova generacio transprenas.

- - - -
Por mi - redaktoro - la respondecado kompreneble estas granda. Mi devas serĉi la vidpunkton de aĝo kiun mi ne havas, vidpunkton kiun mia generacio neniam havis.

Strange estas legi la - ne tro multajn - leterojn kun kritiko aŭ laŭdo. Iuj diras: krucvort-enigmon ni ne bezonas. Alia diras: Dankon pro la krucvort-enigmo, mi lernis multajn vortojn el ĝi. Iu kritikis novelon kaj diris ke tiuspeca legaĵo estas nebona por skolta gazeto, alia legis ĝin kun ĝojo. Iuj diris ke la skoltaj ludoj kaj specialaĵoj - tiajn ni havas pli ol sufiĉe en manlibroj. Aliaj diras ke precize tio igas la gazeton leginda por skoltoj. Sed kiel mi ofte diris: Mi estas redaktoro, nur. Kaj dependas de la materialo, kiun **vi** alsendas.

Hans Amund




KLIRO KUN

OBSTAKLOJ

Kalkulu la tempon en sekundoj. Aldonu 5 "pun-sekundoj" kiam eraro estas farita.

1. Kuro je 100 metr.
2. Ekvilibro: kuro kun pomo sur kulero inter la dentoj. Falo: + 5s !
3. En mallumo al la celo !
4. Salti trans arbo kaj
5. Zigzagi inter obstakloj. Ĉiu tuŝo de obstaklo: +5s. Máltrafo: + 5 sek.
6. Unufoje ĵeti al la celo.
7. Ŝovi pilkon per la nazo, ĉirkaŭ 5 metrojn.
8. Kuri 10 metrojn kun glaso da akvo en unu mano, dum oni sonorigas sonorilon per la alia. Okaze de malsukceso; denove !
9. Per la dentoj levi pomon el pelvo kun akvo.
10. Laŭ la ŝnuro, per manoj kaj piedoj de arbo al arbo.

Ideoj: Scout-magazine
Aŭstralio
Jan.Feb. 1983.



OKULVITROJ

estis iam signo de granda saĝo - nun tamen pli estas signo de malfortiĝanta spirita kapablo. Sed riagru al la bildo sube - estas detalo el altarbildo germana el la jaro 1404, kaj la artisto pentris unu el la apostoloj kun okulvitroj!

Sed tio tamen ne estis ebla. La unua, kiu priskribis pligrandigilan vitron (laŭ nia scio) estis araba fizikisto Alhàzen, kiu vivis en Egiptujo ĉ. la jaro 1000, kaj kiam liaj verkoj tradukiĝis al la latina, ili trovis sian vojon al la monaĥejoj de Eŭropo, kaj en la komenco de la 13-a jarcento ni havas la unuan sciigon pri okulvitroj el monaĥejoj en Anglujo, Germanujo kaj Italujo. Ni ne konas la nomon de la farinto, sed fakto estas, ke la 23-an de februaro 1305 Giordano de Rivalto, monaĥo el Piso, sur la pupitro de Santa Maria Novella en Firenco deklaris, ke ankoraŭ ne pasis dudek jaroj post unu el la plej grandaj artaĵoj de la mondo eltroviĝis - la arto fari okulvitrojn. Nun denove tiuj skribosciaj kaj artomeritaj monaĥoj kiuj pro malforta vidkapablo devis ĉesi la arton kopii manuskriptojn, povis repreni plumon kaj penikon kaj denove krei la belegajn librojn pri kiuj ili estis famaj. Nur 200 jaroj poste Gutenberg celis per sia arto krei librojn same belajn kiaj estis la mane kopiitaj.

Sed la arto de Gutenberg pligrandigis la bezonon de okulvitroj. Jam en la 1400-jaroj amasproduktiĝis okulvitroj en Nurnbergo, Venecio kaj Harlem. Unue nur konvexaj lensoj - sed kiam ankaŭ

la konkavaj venis, la problemo teni ilin surloke pligrandiĝis. Voltaire diras en *Kandido*, ke "en tiu ĉi mondo plej bona el ĉiuj, ĉio havas sian intencon, ĉio kreiĝis por tiu celo. Rigardu nur al la nazo, ĝi estas kreita por teni la okulvitrojn." Tamen - problemo restis:



Kiel zorgi, ke la okulvitroj ne malsuprenfalas. En Italujo oni fiksas stangeton al la okulvitroj, kaj premis tiun sub la ĉapelon aŭ fiksas ĝin per rubando ĉirkaŭ la kapo. En Hispanujo oni preferis rubandojn silkajn noditajn post la oreloj, dum la ĉinoj havis ŝnurojn kun malgrandaj pesiloj kiuj pendis malantaŭ la oreloj. Kaj 350 jaroj pasis antaŭ ol angla optikisto ekhavis la ideon alligi stangetojn per fleksibla kunligo, tiel kiel ni hodiaŭ konas.

Kaj la okulvitroj fariĝis modo. En Hispanujo aristokratoj sin beligis per grandaj okulvitroj noditaj per silkrubandoj al la oreloj, tiel ili volis gajni respekton. Sed en aliaj landoj virinoj malvolonte sin montris publike kun okulvitroj - tiam devis esti eleganta monoklo sur stango.

Kaj monoklo sen stango ankaŭ venis el Anglujo kaj estis ties kontribuo al la modo: Bezonata estis militista konduto kaj aspekto de alta estimo por porti tian okulvitron! Sed pro tio tiuj vere kreis modon - kaj la monokloj estiĝis parto de la ekipaĵo por oficiroj germanaj kaj rusaj. La modo tamen ne transvivis la duan mondmiliton.

La meza klaso bezonis ion pli praktikan, kaj ekuzis "pince-nez", okulvitron kun tenilo kiu premiĝis al la nazo. Kaj elegantaj sinjorinoj aspektis timigaj kun siaj stang-okulvitroj, dum junaj virinoj kun malforta vidkapablo suferis multon - ĉar okulvitroj estis malfeminaj, heblaj. Neniu viro sin turnus por ĵeti duan rigardon al junulino kun okulvitroj!

Tiam venis la sunokulvitroj - kaj ŝanĝis la tuton. Kaj nun: Kiu bezonas okulvitron, uzas ĝin senĝene. Feliĉe! Kaj ni sendu dankan penson al tiuj, kiuj unue komencis tiun evoluon!

INTERNACIA S.E.L.-JAMBOREO 1985

La someron 1985 okazos internacia Esperanto-Skoltisma Tendaro en la suda Svedujo dum 10 tagoj por Geskoltoj el la tuta mondo.

Kiu bezonas monhelpon por vojaĝo k.t.p. devas plejeble baldaŭ kontakti nin kun informo pri la tutaj kostoj por veni al Svedujo por la ĵamboreo.

Skribu tuj al la kasisto Nils Alvar Ekstén, Poŝtkesto 4050, S-261 04 Landskrona, Svedujo.

EL ITALUJO

La 10an de Junio oni festis en Kavalkaselle (Verona) la dekan jarrevenon de la "naskiĝo" de ESPERANTUJO, la Centro de laboro, kulturo kaj feriado, sed ankaŭ skolta centro de SEL.

La datreveno estis dum la Pentekosto - kiu estas ia internacia festo de Esperanto (laŭ la Biblio, Nova Testamento, la disĉiploj de Jesuo parolis kaj multlingva aŭskultantaro komprenis la paroladon senpere.....) Per la loka teledissendo "Telepaca" pastro Ruaro ofte informas pri agado de Esperanto kaj skoltismo.

De la 24a ĝis la 30a de Junio 36 marskoltoj el Nord-okcidenta parto de Italujo kunvenis en Sori, ĉe la fama terpinto de Portofino, kie, ĉe la skolta dometo sur la klifo, oni navigaciis per velŝipoj (Optimist kaj F.J.) kaj oni parolis en Esperanto. Speciala konversacio esperantlingva (kun traduko) okazis pri la specialaj nomoj de mara ilaro.

De la 21a ĝis la 29a de Julio okazos (t.e. -os en la momento de skribado, -is kiam vi legos ĉi tion) la EUROJAMB en Francujo (kun granda renkonto en Parizo la 25an de Julio) kun 800 junaj skoltoj el la Europa Federacio. Ĉu Esperanto, ĉu SEL ĉeestos? ESPEREBLE!

De la 4a ĝis la 12a de Aŭgusto lokaj SELanoj (el la urbeto Peschiera s/ Garda) kamparos sur la proksima monto Baldo. Estas la unua kamparo sub la flago de Esperanto, kaj ĉeestos ĉ 25 geskoltoj. Ĉiutage la speciala alvoko de SEL (vidu la numeron 1/84) supreniras al la ĉielo kune kun la flago mem.

De la 20a ĝis la 28a de aŭgusto kaj de 28a ĝis 1a de septembro okazos du navigaciaj kamparoj ĉe Rimini sur la Adriatika marbordo. Jam aliĝis tri SEL-anoj. Nia Prezidanto mem sin anoncis al la unua.

De la 7a ĝis la 9a de septembro okazos la kutima bicikla konkurso, la Skolta Raleo de Garda Lago, dum kiu 400 - 500 junaj geskoltoj kunvenas al simpatia karavano. Per laŭtparolilo ofte oni parolos ankaŭ en Esperanto.

KORESPONDI deziras Nils Alvar Ekstén, Poŝtkesto 4050, S-261 04 Landskrina, Svedujo, precipe kun skoltinoj kaj gvidantinoj el Azio kaj "malproksima" oriento. 36-jar-aĝa. Respondas kun foto.

EL SVEDUJO

Dum la sveda nacia tago - Tago de la sveda Flago - la sveda sekcio de SEL havis la honoron ricevi svedan flagon donace de la sveda ŝtato, la komunumo Landskrona kaj la institucio "La Sveda Flago" kune.

Pro interkonsento inter la oleofirmao Gulf kaj la sekcio la svedaj SEL-membroj nun povas ricevi 10 oerojn por ĉiu litro bensino, diselo aŭ bruloleo aĉetita. Samtempe la firmao sendas 8 oerojn por ĉiu litro al la kaso de la sekcio, kiu tiel esperas pri regula enspezo, samtempe kun la avantaĝo, kiun tio donas al la membroj.

SEL havas - senpage - lokalojn en Landskrona kaj uzas ilin por ekspozicioj kaj oficejo.

La sekcio nun povas partopreni en radioelsendoj. En Svedujo oni havas tielnomitajn NÄRRADIO-elsendoj, t.e. radio por nur la pli proksima distrikto. Kaj SEL povas nun doni informojn per ĝi.

Ekspoziciojn la sekcio regule aranĝas. Nia bildo montras tian, kaj la sekcia kasisto kaj fervorulo Nils Alvar Ekstén staras antaŭ ĝi kune kun profesoro Spumenka Stimec el Internacia Kultura Servo en Zagreb.

La ekspozicio funkcios dum la granda Skania Foiro, kiun vizitas ĉiutage ĉ. 100000 homoj.

(Daŭrigo sur antaŭlasta paĝo)



EL POLUJO

Ni ricevis informon pri honorigo de unu niaj membroj, kaj rapidas enviciĝi inter la gratulantoj.

S-ro Tadeusz GUEBEL en Polujo dum solenaĵo en sia hejmurbo Wyrzysk nomiĝis Harcmistrz (Skoltmaestro), plej altan rangon de la instruktoro de ZHP. Aldone li ricevis la honoran insignon "Merita instruktoro", kaj fine la krucon "Merita por ZHP". Tio estas la plej alta honora insigno kiun la pola skolta movado havas.

Tadeusz komencis sian karieron kiel lupo antaŭ 47 jaroj.

Nun li profitis el tiu solenaĵo por fari antaŭenpuŝon por SEL en sia urbo.



Svedaj gazetoj nun raportas pri la vizito de Jadwiga WAJNOWSKA el Czeszchowa en Polujo al SEL en Svedujo, t.e. ĉe nia amiko Ekstén en Landskrona.


Oni aranĝis i.a. partoprenon en la someroprogramo de la distrikto, tiel ke ŝi ludas kaj kantas pole kaj esperantlingve de sceno. Multaj ĉeestis, kaj ŝi ricevis fortan aplaŭdon.

Pli poste venos aliaj poloj, bulgaroj, hungaroj kaj koreanoj por simila vizito. Kompreneble tio vekas intereson en Skanio (la suda parto de Svedujo) kaj oni utiligas tion por PR por nia afero.

Anna Skibowska, 13 jaraĝa pola skoltino, adreso Dobrzyniewo, PL 89 311 apud Wyrzysk, Pomeranio, Pollando, kaj Arleta Sobieszczyk, 17 jaraĝa pola skoltino, adreso Placo de Libereco, Wolności n-ro 8/1, PL 89 310 Lobzenica, Pomeranio, Pollando ambaŭ deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, Poŝtkartojn, esperantaĵojn, suvenirojn ktp. Ambaŭ estas lernantinoj, komencantoj, de supre menciita Tadeusz Guebel kaj membroj de la esperantoklubo Amikeco kaj de la pola skoltasocio.

AL LA STELOJ

TAURUS, la virbovo, estas la bovo al kiu Jupitero sin transigis kiam li forportis la junan principidinon Eŭropo. La ruĝa okulo, Aldebaran, estas la plej facile trov-eblan (legu pasintnumere), kaj apud ĝi estas Hyades, la vizaĝo de la virbovo. La Hiadoj estas ĉ 150 steloj, 120 lumjaroj for, dum Aldebaran estas duobla stelo, 68 lumjarojn for. La stelgrupo Pleiades, la sepstelaro, troviĝas en la Tauro. Super la hiadoj, kiuj kreas V, sin levas la du kornoj de la virbovo. La pli supra - kaj sufiĉe granda - stelo sur unu korno samtempe estas parto de la stelobildo Auriga.



MIA BILDLIBRO DE ESPERANTO

estas praktika lerno/legolibro por komencantoj, speciale junaj. Ĝi estas havebla rekte de John MOORE, 7 Pelican St, EMU PARK QLD 4702 Aŭstralio. Tre tauga por skoltetoj, skoltoj kaj skoltinoj. Aerpoŝte po \$2 (aŭst. aŭ usonaj). Teksto en Esperanto kaj la angla, kun bildoj. 28 paĝoj.

KORESPONDU:

Mia nomo estas Ernesto TOVAR kaj mi estas 15-jara perua skolto. Miaj hobiaj estas kolektado de poŝtmarkoj, moneroj, bildkarto, skoltaj insignoj ktp, krome praktiki en sportoj kaj skribi en Esperanto-Adra: Pumacahua 1550-B, Jesús-María, LIMA, Peru.

Se iu sur la suda terglobduono povus sendi artikoletojn pri la stelbildoj sur la suda hemisfero, ni ĝojus publikigi tiajn. Memoru: La redaktoro estas norvego, kaj konas nur la nordon.

LA ALTARO DE JOSUO

Josuo konstruis sur la monto Ebal altaron al la Eternuo, Dio de Izrael, kiel ordonis Mosen, servanto de la Eternulo, al la Izraelidoj, kiel estas skribite en la libro de instruo de Moseo, altaron el ŝtonoj nehakitaj, sur kiujn oni ne levis feron. Kaj oni alportis sur ĝi bruloferojn al la Eternulo, kaj oni buĉis pacoferojn. Kaj li skribis tie sur la ŝtonoj kopion de la instruo de Moseo, kiun li skribis antaŭ la Izraelidoj.

Josuo 8.30-32

Arkeologoj el la universitato de Haifo antaŭ nelonge malkovris tre gravan trovon. Estas Izraela kulta loko el la 12.a jarcento antaŭ Kristo proksime al loĝejo en Samario, kaj la arkeologoj opinias, ke ili trovis la altaron kiun Josuo faris sur la monto Ebal.

La trovon oni faris dum la tria jaro de elfosadoj kiujn profesoro Adama Zartal gvidis en nepublika militarareo. La universitato diras ke la elfosadojn oni faras por havi arkeologian superrigardon super la norda Samario, kie la tribo de Manaso loĝis.

Sur supraĵo de la monto Ebal, 940 m super marnivelo, oni trovis bone konservitan ŝtonan muron. Ĝi ĉirkaŭis areon de 300 m², malple-

nan escepte

de granda konstruaĵo

7 x 9 m en

la centro,

farita el

grandaj

ŝtonoj kaj

plenigita

de ŝtono

kaj tero.

Tiu amaso

ŝajnis tien

metita in-

tence, ĉar

en ĝi estis

ankaŭ res-

taĵoj de

ostoj de

ŝafo, kaj


de cindroj.

En la fundo

de ĉio es-

tas pluraj

instalaĵoj



LA ALTARO DE JOSUO

kies uzo oni ankoraŭ ne scias. Ĉe la okcidenta muro oni elfosis du ŝtonkovritajn kortojn. Tie estis pluraj konstruaĵoj kun cindroj, ostrestaĵoj de ŝafo kaj argilaj ujoj.

Cirkaŭ la kortoj estis dekduoj malgrandaj strukturoj kun kvarangula aŭ cirkla formo. En la pli multaj la arkeologoj trovis argilajn ujojn, ŝajne intence tie metitaj.

La Hajfa-universitato diras, ke tio estas unika trovo, sen paraleloj ie en la lando. Analizo de la argilaĵoj montras, ke la kultokon oni uzis dum mallonga periodo en la 12a jarcento antaŭ Kristo, sed estis poste forlasita.

La altaron de Josuo la Biblio unuafoje mencias en Readmonoj 27.1-8. Ni citas la version 4-8—

Kiam vi transiros Jordanon, tiam starigu ĉi tiujn ŝtonojn, pri kiuj mi ordonas al vi hodiaŭ, sur la monto Ebal, kaj ĉirkaŭŝmiru ilin per kalko. Kaj konstruu tie altaron al la Eternulo, via Dio, altaron el ŝtonoj; ne levu sur ilin feron. El ŝtonoj tutaj konstruu la altaron de la Eternulo, via Dio, kaj alportu sur ĝi bruloferojn al la Eternulo, via Dio; kaj buĉu pacoferojn, kaj manĝu tie, kaj estu gaja antaŭ la Eternulo, via Dio. Kaj skribu tre klare sur la ŝtonoj ĉiujn vortojn de ĉi tiu instruo.

Kun permeso el "Glimt fra Israel"

EL SVEDUJO

Svedujon vizitas nuntempe polaj skoltinoj. Helpas ilin la sveda Helpagada Kaso, tiel ke la restado en Svedujo estas senpaga, kaj ĝis 25% de la vojaĝkostoj kovrataj.

Por siaj agadoj la sveda sekcio petas helpon. Por la ekspozicio ĉia materialo estas bonvena - tiu estu esperantaĵo aŭ skoltaĵo, foto, gazeto, insigno, emblemo ktp. Por la radioelsendoj geskoltaj kaj esperantaj kantonkasetoj estas bonvena, kaj kompreneble la helpagado akceptas mondonacojn. Adreso: Poŝtkesto 4050, S 261 04 Landskrona. Sveda poŝtĉekkonto 477 49 83 - 3.

Korespondemuloj ankaŭ havas ŝancon: Nils Alvar Ekstén (ĉe la supra adreso) deziras mondvastan korespondon kun skoltinoj. Li estas 36-jar-aĝa skolto (marskolto) kaj relative nova esperantisto.

La sveda sekcio ankraŭ vendas broditajn insignojn, diametro 10 cm, aŭ plastikajn glumar-kojn 12x12 cm. La broditaj kostas 20 sv kr, la plastikaj 15 sv kr, inkl afranko

Alia korespondemulo: Eva Fridh. 20-jara ino, kun speciala intereso por birdoj, deziras kor. Sendu la leteron al adreso de Ekstén.

La Korea esperantogazeto donis informojn pri la agadoj en Svedujo kaj petis ĉe siaj legantoj helpon al ĝi!

FULGORO

estas la nomo de insekto(j) kiu(j) vivas en multaj landoj. Dum ili flugas, iu parto de la korpo elsendas subitajn lumsignojn kiel ia seksstimulo por aliaj fulgoroj.

Fulgoro ankaŭ estas la nomo de kanada skoltludo por malluma vespero aŭ nokto.

La ludantaro sin dividas en du partioj, A kaj B. La membroj de A havas en sia korpzono koloritan tukon, kaj ĉiu portas elektran torĉon. Al ili - la fulgoroj - oni donu kelkajn minutojn por sin kaŝi inter certaj limoj, pri kiuj oni antaŭe interkonsentis.


Kiam la estr(in)o blovas sian fluton, la fulgoroj mallonge lumigas siajn elektrajn torĉojn, kaj B devas provi trovi ilin. Kiel signo de la trovo, oni uzu la koloran tukon, kiun portas la fulgoro je la zono. La gvidanto denove blovas sian fluton je regulaj intervaloj, kaj ĉiufoje la fulgoroj denove elsendas lumsignalon. Intertempe ili, kompreneble, rajtas kaj devas ŝanĝi poziciojn.

La ludo daŭru ekzemple dum kvaronhoro - kaj jen A kaj B inter si ŝanĝu. Kaj post nova kvaronhoro oni scias kiu teamo kaj kiu unuopulo pleje sukcesis.



ni ricevis

el Svedujo belaspektan presitan broŝuron kun la nomo "Språk & makt" (lingvo kaj potenco), kie la & estas formita kiel iaspeca verda E por memori pri nia lingvo. Subnomo de la broŝuro estas "Språkfrågan och Tredje Världen". La lingva problemo kaj la Tria Mondo. Svedlingve la aŭtoro pri-traktas la problemon de heredita lingvo el la eŭropo kolonipoten-



co: La pli frua kolonio ne deziras tiun signon de la iama submetiĝo, sed ne havas realan elektelecon: Inter la limoj de la nova ŝtato pluraj lingvoj vivas flank-al-flanke, nur la iama kolonilingvo estas iel "neŭtrala". Samtempe tio kreas ekstreajn kostojn kaj malfacilaĵojn en jam tro malbona lerneja sistemo. Kaj la rezulto kompreneble ĉiam estas sento de diskriminacio dum ĉiuj internaciaj renkontoj.

La broŝuro, eldonita de Sveda Esperantista Junularo, montras al la solvo: Esperanto.

